

Espero Katolika



Numero 4-6/2012

Aprilo-Junio 2012



Sur la kovrilo: Romo, la 19an de majo 2012: en la kvartalo kie estas la C.O. de IKUE okazis procesio kun la statuo de la Dipatrino alportita el la pilgrimloko de Fatimo (v. p. 24). Foto: Antonella Ruggeri.

ENHAVO

“La resurektinta Kristo dispecigis la interplektaĵojn de malbono. Pacon al Proksima Oriento kaj Afriko”

Mesaĝo de la Papo por la Pasko 2012 23

LA DIPATRINO DE FATIMO EN ROMO

La statuo de **Maria** en la paroĥo de la C.O. de IKUE 24

Intervjuo al la nova **IKUE-Prezidanto** Giovanni Daminelli 25

Kunvoko de la **Asembleo** de IKUE 2012 27

PÉCS: “LA URBO SEN LIMOJ”

Historia noto pri la urbo, kiu gastigos la 65an **IKUE-kongreson** 28

Fotoj ... 30

... kaj famaj **esperantistoj** de Pécs 32

DE ROMO AL USONO

Intervjuo al pastro Stefano Hawkes-Teeple 35

FUNEBRE 38

Radio Vatikana, 39 - Landaj Re prezentantoj de IKUE, 40

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * **Dissendolisto:** <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H076010320000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

Pasko 2012: la beno de la Papo al la homaro



**“La resurektinta
Kristo dispecigis la
interplektaĵojn de
malbono.
Pacon al Proksima
Oriento kaj Afriko”**

Per sia Resurekto Jesuo trairis la “mortigan interplektaĵon” de perforto, mensogo kaj envio, kiuj ekzistas en la mondo por savi la homon kaj doni al li novan esperon. Tion deklaris la Papo en la mateno de Pasko, la 8an de aprilo 2012, dum sia Mesaĝo *Urbi et Orbi*. Benedikto la 16a redeklaris, ke la renkonto kun Kristo “ŝanĝas la vivon”: Li “spertigas al ni la tutan bonecon kaj verecon de Dio, kiu liberigas nin de la malbono ne en maniero supraĵa, pormomenta, sed nin liberigas radikale, nin tute sanigas kaj rehavigas al ni nian dignon”.

La manko de paco kaj stabileco fontas el la koro de la homo kaj tion la Papo diris klare: “La espero, en ĉi tiu mondo, nepre devas kalkuli kun la malmoleco de la malbono. Ne nur la muro de la morto malhelpas ĝin, sed eĉ plimulte la pikaj pintoj de envio kaj de orgojlo, de mensogo kaj de perforto. Jesuo trapasis ĉi tiun mortigan implikaĵon, por malfermi al ni la irejon al la Regno de la vivo”.

Benedikto la 16a adresis poste sian penson al la martirigitaj regionoj de la planedo, preĝe alvokante la pacon kaj esperon de la Resurektinta Kristo aparte por Proksima Oriento kaj Afriko.



Antaŭ la fina beno Benedikto la 16a faris la tradician paskan saluton en 65 lingvoj inkluzive tiun en Esperanto, kiun akceptis ĝojoplena kriego de la esperantistoj kiuj ĉeestis en placo sankta Petro por la 22a sinsekva fojo kun siaj paneloj.

La subtekstado de la samtempa elsendo de la itala televido listigis la salutojn de la Papo kaj post la bondeziro en Esperanto, ĝi montris la panelojn dum pluraj sekundoj.



LA DIPATRINO DE FATIMO EN ROMO (ne malproksime de IKUE)

Unu el la pli signifaj religiaj eventoj en Romo dum majo 2012 estis la alveno de la statuo de la Dipatrino de Fatimo. De la 13a ĝis la 20a de majo la vojaĝanta statuo de Maria, rekte el la portugala pligrimloko, estis elmontrata en la preĝejo de sankta Maria de la Gracoj, la paroĥo plej proksima al Vatikano, **la paroĥo de la Centra Oficejo de IKUE**.

Temis pri grava evento de kredo kaj devoteco, kiu volis soleni la 95an datrevenon de la apero de la Virgulino en Cova da Iria. La “pilgrimanta” Madono alvenis fakte al Romo en la sama tago kiam Maria aperis al la etaj paŝtistoj Francisko kaj Jacinta Marto kaj al ilia kuzino Lucia dos Santos: la 13an de majo 1917.

Ankaŭ la alvenhoru de la omaĝata bildo ne estis hazarda: horo 20a, kiu korespondas, laŭ horzonoj, al la momento kiam, laŭ la atesto de Lucia, la du gefratoj Marto revenis hejmen por diri al siaj gepatroj, ke ili vidis “belegan Sinjorinon”.

Post kelktaga restado en la fama roma pilgrimloko “de la Dia Amo”, la statuon oni portis el la baziliko de sankta Johano Laterana al la paroĥo. Sekvis intensaj tagoj de celebroy kaj solenadoj: ĉiuvespere okazis rendevuo por aparta kategorio de fideluloj: paroĥaj grupoj, junuloj, malsanuloj, familioj, geedzoj, konsekritoj. La preĝejo restis malfermita seninterrompe de la 7a matene ĝis la 22.30 kaj Mesoj okazis dum la tuta tago. Dufoje tage oni trapreĝis la Rozarion kaj oni okazigis ankaŭ eŭkaristian adoradon kaj krucvojon. Kulmina momento estis la renovigo – ĉiuvespere, post la Meso - de la sinkonsekro al la senmakula Koro de Maria.

Vespere de sabato la 19an de majo okazis procesio kun torĉoj tra la kvartalaj stratoj: al ĝi estas dediĉita la kovrila fotografio de ĉi tiu numero de Espero Katolika.

La parokestro deklaris: “Entute ni respondas al deziro de la Madono mem, kiam, dum la apero de 1917, Ŝi petis esti kondukata tra la mondo por revigligi la kredon kaj amon al nia Sinjoro”.



Preĝante ankaŭ por la bezonoj de IKUE kaj de la katolika E-movado, mia edzino kaj mi partoprenis en la vespera procesio kaj estis grandega emocio povi stari vizaĝ-al-vizaĝe – kvankam nur kelkminute – kun la tre amata bildo de la Dipatrino de Fatimo. (cs)

*Nia nova prezidanto Giovanni Daminelli
estis intervjuita de la E-redakcio de Radio Vatikana*

“MI KONFIDAS EN LA DIA HELPO POR DAŬRIGI JARDEKOJN DA SINOFEREMA AGADO”

Karega Giovanni, bonvolu prezenti vin.
Unue mi deziras saluti ĉiujn aŭskultantojn de la Esperanto-elsendoj de Radio Vatikana kaj danki vin pro via gastigo. Do, kion diri? Mi estas Giovanni, en Esperanto Johano, la nomo de mia avo. Mi naskiĝis en aŭgusto 1943, kiam ankoraŭ en Italio estis reĝo. Mia naskiĝurbo estas Bergamo, en Norditalio, famkonata, ĉar en ĝi naskiĝis la muzikisto Gaetano Donizetti kaj en ĝia provinco Papo Johano la 23a, sed ne nur: verŝajne kelkaj el viaj aŭskultantoj jam scias ke en la bergama provinco naskiĝis via antaŭa redaktoro pastro Battista Cadei, al kiu, se vi permesas, mi sendas tutkoran saluton.

Ni ne nur permesas, sed ni volonte aliĝas al la salutoj al nia karega pastro Battista.

Bone. Mi tuj deziras diri, ke mi ne ŝatas paroli pri mi mem. Mi akceptis vian inviton nur pro la deziro iomete helpi la Esperanto-redakcion de Radio Vatikana, ĉar mi imagas, ke la aŭskultantoj deziras de tempo al tempo aŭskulti alies voĉojn. Nu, kio povas interesigi la aŭskultantojn pri mi? Mi doktoriĝis pri matematiko, sed mi ne fariĝis instruisto. Dum longaj jaroj mi laboris kiel matematikisto ĉe esplor-centro de internacia firmao, kie mi interesiĝis precipe pri matematikaj modeloj de inĝenieriaj strukturoj kaj pri komputila programado; tio, ĝis kiam mi emeritiĝis en la jaro 2002.

Kaj Esperanto? Kiam kaj kiamaniere vi



Nia prezidanto vizite al la Ŝtato de la vatikana civito: fone videblas la apostola (papa) palaco.

ekkonis ĝin? En la senco: matematiko kaj kalkuladoj jes iel estas kompareblaj al Esperanto, lige kun prefiksoj kaj sufiksoj, kvazaŭ matematika formulo, sed se dum mi diras tion, mi jam aŭdas riproĉojn de esperantistoj, ĉar mi diras la saman tezon kiun de tempo al tempo, ekde pioniraj jaroj, oni levis kontraŭ Esperanto, por diri ke ĝi ne estas vivanta, homa lingvo...

Efektive jes. Mi doktoriĝis per tezo pri matematika logiko, kaj profesie devis lerni kelkajn komputilajn lingvaĵojn, pro tio mi emis interesiĝi pri lingvistiko.

Komence mi imagis, ke Esperanto, artefarita lingvo, estas ia speco de komputila kodo, kiu, pro tio, ne povas esprimi ĉiujn nuancojn de la homaj lingvaĵoj. Kiam oni sciigis al mi, ke la Katolika Esperanto-Centro de Milano, starigis kurson pri ĉi tiu lingvo, fare de nia neforgesebla Glauco Corrado (*). Mi tuj aliĝis, nur pro scivolemo. Baldaŭ mi komprenis, ke Esperanto ne estas kodo, sed vera lingvo, per kiu oni povas esprimi ĉian ideon, mesaĝon, senton. Ĝi estas vere genia planlingvo.

Kiamaniere vi fariĝis esperantisto?

Konvena demando, ĉar ne ĉiuj, kiu lernis Esperanton estas esperantistoj. Mi esperantiĝis en la jaro 2000, kiam mi eltenis la unuagradan ekzamenon. En tiu jaro, en Rimini okazis la 53a IKUE-kongreso. Ankaŭ en ĉi tiu okazo, mi aliĝis nur pro scivolemo: mi volis sperimeti mian konon de la lingvo post sesmonata kurso. Mi miregis konstatante, ke mi komprenas preskaŭ ĉion kaj eĉ kapablis iomete paroli. Por mia profesio ĉiutage mi devis uzi la anglan kaj ĉiujare mi vizitis kurson pri la angla lingvo; malgraŭ tio, mi devis konstati, ke mia kompreno de la esperanta elparolo estas pli alta ol tiu de la angla. Tio entuziasmigis min kaj faris min esperantisto.

Vi estas la nuna prezidanto de IKUE, sed vi havas aliajn taskojn en la itala E-movado ĉu?

Jes, pro emo helpi ĉiujn, kiuj petas min, kun la paso de la jaroj mi akceptis plurajn movadajn taskojn: jam en la jaro 2002 mi eniris la estraron de UECI (la itala sekcio de IKUE) kaj en la posta jaro (2003) mi iĝis ĝia prezidanto, ofico kiun mi tenas ĝis nun. En la sama periodo mi iĝis prezidanto da la Katolika Esperanto-

centro de Milano kaj konsiliano de la E-klubo de Milano. La pasintan jaron, mi iĝis sekretario de la Itala Instituto de Esperanto kaj estro de la E-katedro de Milano. Plue mi tenas kursojn pri nia lingvo en interreto, ĉe la Universitato de la Tria aĝo kaj ĉe la sidejo de nia klubo.

Vi diris, ke vi aktivis ĉefe en la itala E-movado. Kiel vi fartas – por tiel diri – en internacia medio, kun grava tasko?

Sincere mi konfesas, ke multaj aspektoj de la vivo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista estas por ni nekonataj. Kial do mi akceptis kandidatiĝi por ĉi tiu tasko? La insistado de kelkaj samideanoj, kiuj firme kaj afable petis tion, konvinkis min. Eble mi ne estas la plej taŭga persono – pri tio mi konscias – sed devas esti ja iu, kiu surprenas ĉi tiun ŝarĝon. Tamen, mi konfidis en la dia helpo, ĉar ni scias, ke Li por realigi siajn projektojn elektas plej ofte la ŝajne malplej dignajn, por ke ili estu simpla ilo en Liaj manoj.

102 jara historio estas malantaŭ vi. Ne eblas resumi la tutan historion ĉi tie, sed almenaŭ ni diru, kiamaniere vi imagas la estontecon de IKUE. Kiu estas via laborplano, se mi povas tiel paroli?

Mi plene konscias, ke mi ricevis taskon, kiu daŭrigas jardekojn da sinoferema, malavara kaj ofte ne-konata agado de miloj da homoj. Al la antaŭaj Prezidantoj miaj antaŭuloj mi adresas mian profundan

(*) *Prof-ro Glauco Corrado (1937-2004) instruis Esperanton dum preskaŭ 40 jaroj, gvidante nenombreblajn kursojn kaj verkante ankaŭ gramatikon por italoj. Alia kolosa laboro de li farita estis la E-traduko de la "liturgio de sankta Ambrozo". Li estis ankaŭ la ĉefa kunlaboranto de pastro Lorenzo Longoni (frato de la iama IKUE-prezidanto, pastro Ferdinando), interalie por la realigo de la bulteno de la katolika E-centro de Milano.*

dankemon kaj admiron. Jes la agado por fari estas multa. La celoj kaj la vojo estas priskribitaj de nia statuto: pere de la lingvo Esperanto, realigi religian, eklezian kaj laikan sperton, montri la unuecon de la Eklezio, uzante la internacian lingvon en ĝia liturgio kaj apostola agado; kontribui al realigo de la homaj interkompreno, frateco kaj paco en la nuntempa mondo; agadi por la ekumena movado.

La planita agado estas vere multa, ĉu oni povas realigi ĉion?

Nia movado travivas situacion saman al la multegaj movadoj tra la mondo bazitaj sur volontulado. La aferoj por fari superabunde superas la kunlaborantojn je dispono. Mi petas de ĉiuj preĝojn, por ke Dio sendu laborantojn en sian vitejon. Mi konfidas, ke la Providenco – kiu cetere neniam

mankis en nia rondo – daŭre subtenu nin.

Kaj kiuj estas la plej baldaŭaj realigoj de IKUE?

Du estas la kernaj farenaĵoj por la vivo de la asocio dum la baldaŭaj monatoj. Unue la konstanta reaperigo de nia oficiala organo Espero Katolika, kiu estas la plej malnova daŭre aperanta Esperanto-revuo. Due, la okazigo de nia ĉi-jara kongreso, en kiu certe aperos elano por daŭrigi nian agadon.

Ni kore dankas pro via komplezemo, akcepti kelkajn demandojn de ni.

Estas mi kiu dankas vin pro via gastigemo. Kristanan saluton al ĉiuj aŭskultantoj!

*RV-elsendo en Esperanto
de la 7a de junio 2012*

<http://www.radio-vatikana-esperanto.org/elsendo.php?d=2012-06-07>

KUNVOKO DE LA IKUE-MEMBRARO

La **Asembleo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista IKUE 2012** okazos en Pécs (Hungario), kadre de la 65a kongreso, la tagon 17an de julio 2012 ekde horo 9.15 en la “salono 2” de “A Ciszterci Rend Nagy Lajos Gimnáziuma és Kollégiuma” (*esperante: gimnazio kaj universitato “Ludoviko la Granda” de la Cistercia ordeno*) adreso: Széchenyi tér 11, H-7621 Pécs, por debati kaj decidi laŭ jena tagordo:

1. Preĝo. Rememorigo pri niaj mortintoj
2. Salutvorto de la Prezidanto
3. Elekto de balota komisiono
4. Raporto pri la agado de IKUE kaj de ĝia Centra Oficejo dum la jaro 2011
5. Raporto pri financa bilanco
6. Voĉdono por aprobo de la prezentitaj raportoj pri agado kaj financa bilanco.
7. Raportoj de la L.R.-oj kaj de la naciaj ligoj
8. Estontaj kongresoj
9. Proponoj por estonta agado
10. Diversaĵoj.

La Prezidanto de IKUE

Oni memorigas, ke laŭ la Statuto de IKUE povas partopreni en la Asembleo ĉiuj membroj de IKUE kondiĉe, ke ili atingis sian 18an vivojaron je la 17a de julio 2012 kaj ke ili pagis la aliĝkotizon. Ĉiu membro povas reprezentigi sin fare de alia membro pere de skribita delegilo, prezentenda al la gvidorganoj de la Asembleo je la komenco de ĝiaj laboroj. Ĉiu membro ne povas havi pli ol 3 delegilojn.

PÉCS: “LA URBO SEN LIMOJ”



Sudokcidente de la lando, proksime de la landlimoj kun Kroatio kaj Serbio, staras unu el pli malnovaj hungaraj urboj: **Pécs**.

En ĝia teritorio jam prahistorie estis homaj establiĝoj, kiel atestas la plej antikvaj arkeologiaĵoj, kiujn oni taksas 6.000 jarojn malnovaj. En la 4-5a jc a.K. vivis tie panonoj (iliraj kaj keltoj) ĝis kiam komence de la 2a jc p.K., post konkero de la teritorio fare de la romianoj, estis fondita urbo *Sopianæ*. Ĝia nomo verŝajne estis la plurala formo de la kelta vorto “sop” (marĉo) kaj en ĝi vivis 8 ĝis 10 mil loĝantoj. Dum la romia regado la urbo fariĝis ekde la 3a jc ĉefurbo de provinco Panonio Valeria. La alveno de kristanismo datiĝas antaŭ la 4a jc, kiel atestas la pluraj tre valoraj prakristanaj tombokapeloj kun belegaj murpentraĵoj. Dokumento de la jaro 871 nomas la urbon *Quinque Basilicae* (kvin bazilikoj), kun aludo al la fakto, ke por la konstruo de la preĝejoj oni uzis materialojn de kvin malnovaj kristanaj kapeloj. En pli postaj dokumentoj la urbo estas nomata *Quinque Ecclesiae* (kvin preĝejoj).

Je la fino de la 4a jc la romia regado finiĝis pro la invadoj de barbaroj kaj hunoj. Sekvis la alveno de avaroj kaj slavaj loĝantaroj ĝis

Prakristana tombejo



kiam la teritorio fariĝis parto de la Karolida Imperio. Ĉirkaŭ la jaro 900 alvenis la madjaroj (prahungaroj kies origino estis el Siberio). La urbo montras la signojn de ĉiuj ĉi ĉeestoj, al kiuj aldoniĝis poste tiuj postlasitaj de la turkoj, kiel moskeo Paŝao Qasim la venkanto, en placo Széchenyi. La hungara urba nomo mem probable fontas el la turka vorto beŝ (kvin).



Post la hungara landkonkero, en 1009, la unua hungara reĝo, sankta Stefano la unua (ĉ. 969-1038) fondis la episkopan diocezon kaj tiutempe komenciĝis ankaŭ la konstruado de la katedralo.

Jam de la mezepoko Pécs estis grava komerca urbo por germanaj kaj italaj komercistoj, kiuj direktiĝis al Bizanco. Tiam la urbo estis ĉirkaŭata de fortikaĵmuro kaj estis renoma: de tiu epoko datiĝas ankaŭ ĝia proksimuma nuna nomo: Peuthe, Peuche, Penthe.

En 1367 reĝo Ludoviko la unua (1326-1382) fondis universitaton: ĝi estis la unua hungara kaj la kvara plej malnova en la teritorio de la Sankta Romia Imperio. Ĝi havis viglan kulturen agadon, kiun kreskigis en la postaj jardekoj episkopo Csezmicei János (Janus Pannonius, 1434-1472) kroata-hungara humanisto kaj poeto, kiu latine verkis.

Ekde 1543 sekvis la turka otomana superregado dum 143 jaroj - ĝis la 22a de oktobro 1686. Ĝi pliriĉigis Pécs'n per multaj monumentoj ankoraŭ videblaj kaj kiu igis

ĝin des pli floranta komerca urbo. La hodiaŭa aspekto de la urbo estas tamen tiu formita depost la fino de la turka regado kaj la militoj estigitaj por la rekonkero fare de Habsburgoj: temis pri jaroj de militoj, sieĝoj, kiuj plurfoje senpologis la urbon. Per sangaj bataloj, fine Pécs estis liberigita el la turkoj, sed la loĝantaro plejparte ekstermiĝis. Tiam la reĝa kortego de Vieno enloĝigis germanajn kolonianojn. La alia parto de la loĝantaro konsistis el greko-orientaj serbaj kolonianoj.



Katedralo


La urbo ŝanĝis sian aspekton dank' al la urboplanadaj rearanĝoj kaj arkitekturaĵoj, kiujn volis la romkatolikaj episkopoj-mecenatoj, kiuj estis ĝiaj guberniestroj ĝis 1780, jaro en kiu reĝino Maria Tereza de Hungario deklaris Pécs'n libera reĝa urbo.

Nur ekde la 18a jc, en relativa trankvileco, la urbo povis pace evolui: kreskis signife la industrio, la civitana vivo kaj la urbo ricevis barokan aspekton. Laŭ la unua censado (farita laŭ ordono de reĝo Jozefo la 2a) en 1787 Pécs konsistis el 1.474 domoj kaj 1.834 familioj; entute temis pri 8.853 loĝantoj, el kiuj

133 pastroj kaj 117 nobeluloj.

Dum tiu 18a jc "konstruantoj" de la urbo estis episkopoj György Klimó (1710-1777) kaj Pál László Eszterházy (1730-1799) kaj ilia kanoniko József Koller (1745-1832), elstara studento kaj amanto de arto.

En 1770 malfermiĝis la unuaj karbaj minejoj. György Klimó gvidis la diocezon kaj la urbon dum preskaŭ 30 jaroj kaj li decidis la ĉefajn gvidliniojn laŭ kiuj la arta mecenatismo de la episkopoj realiĝis en la postaj jardekoj. Li klopodis remalfermi la universitaton, fermita en la 17a jc dum la otomana regado, sed lia deziro realiĝos nur post lia morto, dum mallonga periodo (1785-1802). Male Klimó sukcesis starigi en 1774 grandan bibliotekon (ĝi estis la unua malfermita al publiko en Hungario, kun pli ol 15.000 libroj), la rebonigon de la mezepoka katedralo de sankta Petro fare de la tirola skulptisto Giuseppe Antonio Sartori, la aranĝon de la urbaj ĝardenoj fare de la fama ĝardenisto Matteo Kartiza el Rijeka. La episkopo ankaŭ fondis presejon kaj metiejon de papero. **(daŭrigo je paĝo 32)**





Placo Széchenyi estas la plej granda kaj impona placo de Pécs. Al ĝi, kiu situas sur milda deklivo, kunfluas 12 stratoj kaj en ĝi estas diversaj urbaj konstruaĵoj: la iama moskeo, skulptaĵo pri János Hunyadi, nacia heroo de la lukto kontraŭ turkoj, la kolono pri sankta Triunuo (1710-1714, refarita en 1908), ornamputo, preĝejo de sankta Sebastiano (18a jc), la urbodomo (1897), muzeo, hotelo (iama urbodomo) kaj gimnazio.



PÉCS

*Aliaj fotoj de
Marija
Belošević
kaj
p. Attila Szép*





IKUE-kongresejo 2012

(daŭrigo de paĝo 29)

Episkopo Pál László Eszterházy daŭrigis la agadon de sia antaŭulo kaj komisiis verkojn al skulptisto Sartori, kies ĉefa realigo estis la konstruo de la palaco de la arkivo kaj la episkopeja biblioteko.

Post la morto de episkopo Eszterházy la konstrulaboroj daŭris sub la gvidado de kanoniko Koller, kiu komisiis verkojn ankaŭ al la fama arkitekto Mihály János Pollack (1773-1855), aŭtoro interalie de la Hungara Nacia



Fontano de Zsolnay, omaĝe al fondinto de la porcelana fabriko: kiel la Nacia Teatro (sube), ankaŭ ĝi havas porcelanajn dekoraĵojn.

Muzeo de Budapeŝto kaj de la Reĝa Vilao de Milano (Italio). Pollack realigis la restaŭradon de la katedralo laŭ novklasika stilo, kiun oni finis en 1825. En 1839 oni konstruis la unuan masonigitan teatron de la urbo. En la kvindekaj jaroj de la 18a jc oni fondis la faman porcelanan fabrikon de Zsolnay, ekprosperis la karboproduktado, ekfunkciis la tanejo, la tabakfabriko, la bierfarejo.

Industrio rimarkinde kreskis dum la dua duono de la 19a jc. En 1848 estis 1.739 industriaj laboristoj, multaj dungitaj de nacie konataj fabrikoj; fero kaj papero estis la ĉefaj produktaĵoj, realigitaj per la tiam pli modernaj teknikoj. Ekzistis fabriko de sukero kaj alia de

biero kaj oni ekstraktadis minejan karbon. En tiu periodo estis 14.818 loĝantoj.

Kune kun la industria evoluo la urbo pliriĉiĝis per novaj aranĝoj: la novklasikajn restaŭraĵojn de la katedralo oni malkonstruis por restarigi tiun originan (romanika) kaj aperis multaj konstruaĵoj el secesi-stilo ("liberty").

Dum la revolucio de 1848-49 Pécs estis okupaciita de la kroata armeo, sed ĝin liberigis la Habsburgoj januare de 1849. La urbo konis refloradon post la aŭstria-hungara kompromiso de 1867: ekde tiu jaro novaj trajnaj relparoj kunligis ĝin al najbara urbo Barcs kaj de 1882 al Budapeŝto. Ekde 1913 ĝis 1960 funkciis tram-linioj.

Post la unua mondmilito la tuta regiono estis okupaciita de serbiaj trupoj kaj Pécs estis ĉefurbo de la serb-hungara respubliko Baranya-Baja, eta ŝtato vivinta nur 11 tagojn ĝis la 25a de aŭgusto 1921. Ĝi estis rezulto de ribelo kontraŭ la pripaca Trianona traktato surbaze de kiu Ĉeĥoslovakio ricevis Bratislavon el Hungario, i.a. kun la efiko ke la universitato de Pozsony (Bratislavo en la hungara) translokiĝis al Pécs.

La dua mondmilito ne multe damaĝis la urbon, kvankam granda batalo per tankoj okazis 20-25 kilometrojn sude de Pécs,



ĉirkaŭ la fino de la milito, kiam la ruĝa Armeo liberigis al si la vojon al Aŭstrio.

La postmilita periodo markis denovan kreskon de la urbo, kiu enkorpigis plurajn najbarajn vilaĝojn. Ekde 1945 je soveta instrukcio kaj premo malfermiĝis la urania minejo, kiu altiris pliajn loĝantojn el najbaraj lokoj. En la 80aj jaroj de la 20a jc la loĝantoj jam estis 180.000.

Kun la fino de la socialisma epoko (1989-1990) Pécs kaj ĝia regiono, samkiel multaj aliaj, estis draste markita de la politikaj ŝanĝoj. La procento da senlaboruloj estis alta, oni fermis minejojn kaj fabrikojn, kaj la milito en la najbara Jugoslavio dum la 90aj jaroj malkreskigis la turismon. Tiuj militaj eventoj igis Pécs'n sidejo de la aliancitaj trupoj de NATO, kiuj kontrolis en Bosnio-Hercegovino la respekton de la postmilitaj pacoakordoj de Dayton.

Pro eventoj kaj lokiĝo Pécs ĉiam estis do pluretna urbo, en kiu multaj kulturaj tavoloj "kunŝutiĝis" miksante la diversajn valorojn de plurjarcenta historio. Rimarkindan ekzemplon de tiu interesa historio oni trovas en la ĉefplaco, kie ankoraŭ staras la menciita moskeo Gazi Kasim, kiu, kvankam konsekrita kristana preĝejo post la foriro de la otomanaj turkoj, daŭre havas la kreskantan lunon kaj krucon de Islamo sur sia kupolo. Cetere, Pécs estas la hungara urbo kun plej multe da turka arkitekturo: du el ili estas la ruinoj de la banejoj de Paŝao Memi kaj la tombo de Idris Baba, taksata sanktulo ankaŭ dumvive de la

islamanoj, kiuj pilgrimas al ĝi.

Hodiaŭ hungaroj, ŝvaboj, kroatoj kaj serboj daŭre vivas kune en paco: naŭ etnaj grupoj havas propran memstaran administracion. Tion agnoskis en 1998 Unesko, kiu aljuĝis al la urbo premion "urboj por la paco" pro ĝia respekto de la minoritataj kulturoj kaj pro la toleremo kaj helpemo favore al la rifuĝintoj de la balkaniaj militoj. En 2007 Pécs estis la tria kaj en 2008 la dua en unu el la internaciaj statistikoj pri nivelo de vivokvalito en urboj kun 75.000 ĝis 200.000 loĝantoj.

En 2010 Pécs estis elektita eŭropa urbo de kulturo kune kun Essen kaj Istambulo, kio kuntrenis renoviĝon de ĝia vizaĝo: oni projektis novajn stratojn, placojn kaj renoviĝon de la ĉirkaŭurbo, kune kun novaj kulturaj centroj, halo por koncertoj kaj biblioteko.

Hodiaŭ Pécs estas la kvina pli vasta urbo de Hungario, kun 157.721 loĝantoj (dato de 2011). Ĝi estas la administracia kaj ekonomia centro de departemento Baranya. Pécs estas ankaŭ episkopa sidejo: ekde unu jaro la episkopo estas mons-ro György Udvardy (naskita la 14an de majo 1960). La urbo restas grava fervoja kruciĝo kaj kerno de industria regiono (ledo, ceramikoj, biero, cigaredoj kaj elektronikaj elementoj). Oni likvidis la lastajn karbominejojn kaj la uraniominejon kaj oni ŝanĝis al kultivejo la surfacan karbominejon. La klimato, influita de la proksimaj montoj Mecsek, kaj la multaj monumentaj domoj donas al la urbo etoson tute escepte mediteranea.



Inter ĝiaj vizitindaj lokoj – aldone al la preĝejoj, muzeoj kaj romia *tabularium* - estas la katedralo, la episkopejo, la eksaj moskeo kaj islamaj kultejoj, la biblioteko, la nacia teatro, la prakristana tombejo (monda kultura heredaĵo de Unesko), multnombraj karakterizaj palacoj, internaj kortoj kaj subĉielaj kafejoj el mediteranea stilo, la botanika ĝardeno ĉe la universitato, la pordo kun mil seruroj, la esplor-instituto pri vinologio kaj vitkultivado, kiu posedas vastegan kolekton de vitoj por vinfarado kaj manĝado (preskaŭ 1.200 specoj).

Kaj kion pri Esperanto en Pécs?

Antaŭ la dua mondmilito f-ino **Ilonka (Helena) Fiedler**, naskita en Pécs kaj oficistino de ceramikfabriko, estis la plej persista propagandisto de Esperanto: inter 1907 kaj 1908 aperis duvoluma Hungara Poemaro kiun ŝi kuntradukis. Ŝi estis ĉefestraranino de IKUE kaj verkis artikolojn por *Espero Katolika* ĝis sia morto en 1967.



18a IKUE-Kongreso 1936 en Brno. De maldekstre: nekonato (ĉu eble p. Gyula Lajos?), pastro Kao (Ĉinujo), f-ino Fiedler (Pécs), d-ro Walka (Vieno). el *Espero Katolika*, septembro 1936

En Pécs aktivis – fine de la 30aj jaroj – kiel liga komitatano de IKUE kanoniko **Gyula Lajos** (Julio Lajoš, naskita la unuan de aprilo 1877 en Villány kaj mortinta la 29an de marto 1955 en Pécs). Taksata unua esperantisto de urbo Pécs, li estis katolika kanoniko, paroĥestro de la katedralo en Pécs, direktoro de eklezia kantlernejo. Li esperantistiĝis en 1912. Inter la mondmilitoj li estis gvidanto de la movado en Pécs kaj prezidanto de la loka grupo. Li faris katolikajn diservojn kaj paroladojn en Esperanto, i.a. dum la unua eŭkaristia Esperanto-mondkunveno en Budapeŝto 1938. Li estis



grup-prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1924-1928), komitatano (1928-1936) kaj kunprezidanto (1938-1940) de Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo kaj protektanto (1936-1944) de Hungara Esperanto-Federacio. En 1937 li estis distingita per la arĝenta Jubilea Stelo. En la urbo Pécs (Hunyadi u. 4) estas Esperanto-muzeo Lajos Gyula <http://www.ipernity.com/doc/35820/album/61694>. Kune kun aliaj famaj hungaraj esperantistoj memortabulo omaĝas al li en la E-parko de Pécs <http://tinyurl.com/7fje62f>, inaŭgurita dum la 22a Internacia Junulara Kongreso en 1966.

Adalberto Huleš (1926-2002), renoma esperantisto kaj verkisto en Esperanto kaj la hungara, studis en 1945 kaj 1946 en la medicina universitato de Pécs. En 1964 li transloĝiĝis reen al Pécs. Li instruadis la hungaran kulturon (lingvon kaj literaturon) ĝis 1976. Poste, dungite, li instruadis Esperanton je diversaj niveloj, interalie en la jaroj 1968-69 en la Pedagogia Altlernejo de Pécs. Inter 1969 kaj 1979 li laboris kiel maŝin-manipulisto ĉe la akvo-entrepreno de Pécs. En 1979 li revenis al Budapeŝto.

En Pécs ĉeestas la **Esperanto-asocio de Baranja** <http://www32.brinkster.com/leslieth/> kaj **fervojista klubo**.

En 1973 oni planis komunan kongreson IKUE/KELI en Pécs, kiu devus okazi de la 21a ĝis la 28a de julio. Sed la kongreso ne ricevis la necesan permeson de la hungara ŝtato.

Ĉi-jare ĝi gastigos la kongreson de IKUE.

**65a KONGRESO DE I.K.U.E.
PÉCS (Hungario)
de la 14a ĝis 21a de julio 2012**

La aliĝilon oni povas peti rete al: ikuekongreso@gmail.com, fakse: +385 1 37 45 052 aŭ per ordinara poŝto al la adreso: **Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio, aŭ deŝuti ĝin: www.ikue.org**

DE ROMO AL USONO

intervjuo kun pastro Stefano Hawkes-Teeples

Pastro Stefano, kunredaktoro kaj anoncisto de la E-elsendoj de Radio Vatikana, revenis al sia patrujo Usono. Li forlasis Romon por instrui en la jezuita universitato de urbo Sankta Luiso, Mizurio.

Finiĝis, oni esperas portempe, lia voĉa kunlaboro en la E-redakcio sed li daŭrigas verki tekstojn por la elsendoj. Por scii, kiu estis lia vivo en Romo kaj kiu estos lia vivo en Usono ni faris interparolon kun li.



Kiom da jaroj vi estis en Romo, inkluzivante paŭzojn dum kiuj vi restis ekster Italio?

Mi unue venis al Romo en la somero de 1988, kiam mi komencis la teologiajn studojn ĉe la internacia Kolegio “del Gesù”. Mi estis tie dum 3 jaroj; mi estis for dum parto de jaroj studante la germanan lingvon en Vieno. Mi revenis kaj studis ĉe Orienta Instituto kaj mi finis tiujn studojn en 1997. Mi estis for dum 2 jaroj kiam mi instruis ĉe la universitato Canisius en Buffalo kaj post tio mi estis dum du jaroj en la universitato de Toronto, Regis College, kaj tiam en 2001 mi revenis al Romo kaj ekinstruis ĉe la papa Instituto pri orientaj studoj: mi estis tie ekde tiu tempo. Mi finis mian instruadon en la aŭtuna semestro ĉi-jare ĉe la Instituto kaj iros al Usono kaj komencos instrui ĉe la St. Louis University; mi komencos

instrui tie dum la aŭtuna semestro.

Vĭ restis en Romo dum 11 jaroj sed vi ankaŭ ĉeestis en alilandaj universitatoj. Kiun komunan karakterizon vi povis – se vi trovis – konstati ĉe la diverslandaj studentoj? Ĉu studentoj havas komunan karakterizon?

Ho, bah: mi ne scias. La granda diferenco estas ĉu la studentoj vere interesiĝas pri sia studobjekto. Kiam ili vere interesiĝas pri sia studobjekto, tiam la laboro de instruisto estas grandega ĝojo. Kiam la studentoj ne tiom interesiĝas pri la studobjektoj, tiam estas multe pli malfacile instrui al ili, ĉar oni devigas ilin fari aferojn kiujn ili ne volas fari.

Tamen ĉu vi povis rimarki, ke kelkaj studentoj estis malpli seriozaj ol aliaj?

Jes, certe. Ekzemple en preskaŭ ĉiu studoprogramo studentoj studas temojn, kiuj ne interesas ilin. La studento ne

studas nek interesiĝas pri la studoj: do, oni faras tion, kion oni povas. Cetere mi spertis tion preskaŭ ĉie; en religiaj universitatoj en Usono kie mi instruis estis ĉiam devigaj teologiaj kursoj, kiujn la studentoj devis studi kaj foje tiuj kursoj estis iomete malfacilaj. Tiukaze estis necese “provoki” ilin: ekzemple mi komencis kurson pri mondaj religioj kaj la unua religio, kiun ni studis estis ateismo. Tio iom surprizis la studentojn, ke mi, kiu estas jezuita sacerdoto, kiu estas tie, parolas pri ateismo kaj ĝia rolo en la nuna mondo kaj kiom ĝi havas valoron. Ĝi helpis, ke ni komencu la studon...



Bildo de Sankta Luiso, Mizurio, kun unuavice la Jesuit Hall, kie loĝas hodiaŭ pastro Stefano. Ĝi estis origine Hotelo Melbourne, konstruita en 1923. Kun siaj 15 etaĝoj ĝi okupas relative malgrandan terpecon kaj estas plejparte loĝejo de la jezuitoj, kiuj instruas kaj laboras en la Universitato.

Tio tamen estis helpo por malfermi la okulojn kaj cerbon...

Jes, jes.

Averaĝe kiom da studentoj vi havis?

Nu, dependas. En la orienta Instituto foje ni havas tre fakajn kursojn kiel la bizancaj komentarioj de la Dia Liturgio. Se en tiaj kursoj mi havis 4, 5, 6 studentojn, tio estis ĉio, kion mi povis atendi. En aliaj momentoj, ekzemple, mi havis pli grandajn kursojn, kiam mi instruis enkondukon al la studo de la orientaj liturgioj: tiam mi havis multajn studentojn.

Kiun lingvon vi uzas por viaj lecionoj?

Mi instruas itale tie ĉi; en Usono mi sendube instruos angle.

Kaj ĉu vi spertis lingvajn malfacilaĵojn, ĉe la studentoj por ilia komunikado?

Unue kiam mi komencis instrui en la itala mi devis sufiĉe multe peti helpon de itallingvanoj por korekti diversajn tekstojn ktp, sed ĝenerale mi ne havis malfacilaĵojn. En la orienta Instituto

oni instruas itale, sed preskaŭ ĉiuj niaj studentoj venas el neitallingvaj landoj, do ili unue – kiam ili alvenas tien ĉi – devas ellerni la italan. Kelkaj ne tiom sukcese tion faras.

Ankaŭ ĉar temas pri “teknika” itala lingvo, ĉu ne?

Ja, ĉiuj niaj studoj pri historio, liturgio kaj teologio havas iom specialan vortaron. Se iu jam konas la teologian vortaron en la angla aŭ la franca aŭ la hispana, ĝi estas pli malpli la sama en la itala. La germana kaj la rusa uzas pli da propraj radikoj, do la vortaro estas iom malsimila.

Ĉu en Sankta Luiso vi daŭrigos samajn kursojn aŭ vi tute ŝanĝos la studobjektojn?


Ŝajnas ke en Sankta Luiso mi instruos diversajn kursojn sed mi ankoraŭ ne scias: oni ĝis nun ne parolis pri specifaj kursoj. En la universitato tie ĉiuj profesoroj devas doni almenaŭ unu aŭ du enkondukajn teologiajn kursojn, tio estas kurso, kiu supozas nenian antaŭan studon, do oni devas prezenti bazan komprenon pri kiel

oni studas religiajn kaj teologiajn temojn kaj mi supozeble devos fari tiajn kursojn. Post tio mi faros, plejparte mi opinias, liturgiajn kursojn, kaj en Sankta Luiso oni volas ke mi faru kaj okcident-ekleziajn kursojn kaj orient-ekleziajn kursojn; do, plejparte tie ĉi mi faris tiujn pri la orientaj liturgioj; en Sankta Luiso mi devos fari ambaŭ. Do, mi devos plivastigi iom la “okcidentan” enhavon de miaj kursoj pri liturgiaj temoj.

Kaj ĉu restos loko por Esperanto?

Ho, jes, jes: estas sufiĉe aktiva klubo en Sankta Luiso. Ili havas ĉiumonate du renkontojn; ili havas unu kiu estas konversacia renkonto kaj alia kiu estas iomete pli serioza kluba kunveno en loka biblioteko. Jam dum jaroj, kiam mi estis en Sankta Luiso kaj estis libera, mi iris al tiaj kunvenoj. Do mi rekomencos kaj daŭrigos mian aktivadon kun tiu klubo. Mi daŭre estos delegito de UEA pri orient-kristanaj liturgioj kaj ankaŭ pri la keltaj lingvoj.

Do, vi estos en Usono kaj tamen restos



La kovrilo de nova verko de pastro Stefano: la greklingva originalo kaj la anglalingva versio de la liturgiaj komentarioj de sankta Simeono de Tesaloniko.

Simeono, sanktproklamita de la greka ortodoksa eklezio en 1981, estis ĉefepiskopo de Tesaloniko de 1416 aŭ 1417 ĝis sia morto en 1429. Li travivis sufiĉe tumultan tempon ĉar la urbo estis sub minaco de la otomanaj turkoj.

kontaktoj kun la E-redakcio, ĉar vi povos sendi datenarojn per interreto.

Jes, mi certe daŭrigos mian aktivadon kun la programo, dum estas programo al kiu mi povas iel kontribui; mi tion faros.

Ĉu vi estis kontenta labori en la redakcio...

Ja, mi, mi estis sufiĉe... mi estis...

... malgraŭ Karlo, he?... (ridado)

... mi trovis mian laboron sufiĉe agrabla kaj mi ĝojas pro tiu ebleco. Mi preĝas por niaj aŭskultantoj kaj petas ankaŭ iliajn preĝojn por mi.

La supra interparolo estis elsendita de la E-programo de Radio Vatikana. Reage al specifa eldiro de pastro Stefano aŭskultanto s-ro Tonjo del Barrio skribis: “Mi aŭskultis la adiaŭan intervjuon al Stefano kaj ankaŭ mi volas deziris al li bonan novan vojon kaj sukceson en lia nova kariero en lia naskiĝlando. Mi ne povas ne komenti kiom mi surpriziĝis aŭdante ke li instruis pri ateismo en teologia kurso pri religioj. Mi ne povas forgesi la malnovan komparon, ke tio estas kvazaŭ paroli pri kalveco en kurso pri harkoloro. Ĉion bonan al la tuta skipo!”. Pastro Stefano, per retpoŝto respondis: “Mi dankas pro la bondeziroj. Mia adiaŭo al Romo estis bela kaj kortuŝa momento kun pluraj renkontiĝoj. Mian decidon instrui ateismon en kurso pri mondaj religioj plejparte instigis deziro provoki gestudentojn pensi laŭ nova maniero. Tro ofte gestudentoj de katolikaj lernejoj opinias, ke ili jam scias ĉion necesan pri la religio. Mi serĉis manieron instigi ilin konsideri aliajn aspektojn. Mi salutas la geaŭskultantojn el Sankta Luiso, kien mi alvenis la 15an de marto post vojaĝo al diversaj lokoj en norda Usono. En la venonta aŭtuno mi instruos en la tiea universitato”.

Ni funebras kaj kondolencas



Pastro Florio GIANNINI

(Azzano, 20/03/1936 - Traversagna, 22/01/2012, Italio)

Post paŝtriĝo la 26/06/1960 li estis kapelano en urboj de la itala regiono Toskanio: Barga, Pietrasanta kaj Capriglia, poste paroĥestro en Vologno, Ruosina, Marina di Pietrasanta kaj fine en Capriglia-Tonfano, ĝis kiam li devis forlasi la taskon pro sanproblemoj kaj ekloĝi en la hejmo de sia fratino en Traversagna, kie li mortis. Ĵurnalisto, direktoro de loka katolika gazeto (“Il Dialogo”, la dialogo) li estis ankaŭ verkisto kaj organizanto de teatraj programoj. Li ĉiam vekis ĉe sia komunumo amon, ĝojon kaj admiron. Pro tio multegaj fideluloj ĉestis dum impona solenado en 2010 por festi la 50an datrevenon de lia paŝtriĝo: aperis honorlibro kaj skulptisto amagiĝis al li per bronzaĵo. Same, amaso da fideluloj ĉestis la 24an de januaro en la preĝejo de sankta Antono en Tonfano – kie li estis paroĥestro ĝis 3 jaroj antaŭ ol morti - dum la funebra rito por li celebrata de la ĉefepiskopoj de Pisa kaj de Massa-Carrara kun la emerita episkopo de Volterra. Ĉestis ankaŭ ĉiuj pastroj de “Versilia” (la toskania marborda teritorio kie estis lia paroĥo) kaj la urbestro kaj la vicurbestro de Pietrasanta. Li estis entombigita en la naskiĝurbo Azzano. Membro de IKUE dum pluraj jardekoj, li gastigis en sia paroĥo la kongreson de la itala sekcio de IKUE en 2002. Laste li okupiĝis pri la okazigo de la ekumena Diservo dum la UK en Florenco 2006 kaj celebris la E-lingvan Meson dum la itala E-kongreso en Pisa 2007, kiam evidentiĝis la signoj de lia malsaneco. Post lia morto loka ĵurnalo titoliĝis pri li: “Mortis batalanta pastro”, skribante, ke li ne emis klini la kapon fronte al malĵustaj: ekzemple, li publike reagis per malmola hironio kontraŭ rasismaj frazoj, kiujn oni pentris ĉe la enirejo de lia paroĥo, insulte al pastro Joy, devena el Bharato kaj lia helpanto ĝisfine.

Pastro Sándor SZÉNÁSI

(Bodrogkeresztúr, 16/12/1923 – Nyíregyháza, 22/01/2012, Hungario)

En la 64a jaro de sia pastreco mortis nia hungara esperantisto kaj IKUEano, emerita profesoro de teologio. Li paŝtriĝis la 20an de junio 1948 kaj li estis kapelano sinsekve en Forrón, Sárospatak, Szerencs kaj Szikszó. De 1956 ĝis 1965 li estis paroĥestro en Encsencs kaj poste (1965-1990) li estis profesoro pri teologio en Eger. De 1984 ĝis 1997 li gvidis la paroĥon de sankta Antono en Eger, ĝis sia emeritiĝo. En 1992 li ricevis papan honorajon. La 2an de februaro 2012 en Nyíregyháza okazis funebra rito por li, kiu nun ripozas en la urba tombejo. Membro de la plenumkomitato de IKUE dum pluraj jaroj, li tradukis kaj verkis ankaŭ por EK. Li estis, interalie, membro de la Liturgia Komisiono, kiu ricevis de la Sankta Seĝo la taskon pretigi la Meslibron en Esperanto. Antaŭ 30 jaroj li instruis bibliajn sciencojn al alia esperantisto, diakono János Kirsch, kiu, en funebra komunikado pri sia iama instruisto skribis, ke pastro Szénási dorlotis lin, juna esperantisto, kvazaŭ vera patro. Pro mistera ĉiela aranĝo, diakono János sekvis pastron Szénási al la Ĉielo ne multajn monatojn post lia forpaso.



Pastro Carlo Fortunato CAPUZZI

(Cremona, 04/09/1941 – Parma, 18/03/2012, Italio)

“Dum ĝis sabato nokte pastro Capuzzi konstruis pasie la perspektivon de sia vivo, abrupta morto baris ĉiun eblecon de plia volo servi por la bono de la siaj en Chiusa Ferranda kaj en la tuta nia eklezio”. Per ĉi tiuj vortoj la episkopo de Fidenza, mons-ro Carlo Mazza, enkondukis sian predikon okaze de la funebra rito por pastro Capuzzi, forpasinta pro abrupta ikuso. La episkopo memorigis kiel pastro Capuzzi estis “etulo” laŭ la evangelia konsidero (“Mi Vin glorias, ho Patro, ke Vi kaŝis ĉi tion for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanetoj”, Luk 10,21): eta, ĉar malaltstatura, ĉar li kaŝis sin humile, sed estis alcelato de la

gloro levita al la Patro fare de Jesuo. Konsekrita pastro la 26an de junio 1966, aldone al sia tasko de paroĥestro en Chiesa Ferranda, li estis ankaŭ dioceza delegito por la kunordigo de la marialaj pilgrimlokoj de la diocezo, rektoro de la pilgrimloko Dipatrino *dei Prati* (Busseto, la lokoj de muzikomponisto Giuseppe Verdi). Tiun sanktejon li nomis “preĝejo por Esperanto” ĉar ekde 1999, laŭ rajtigo de la tiama episkopo de Fidenza, li celebris en ĝi de tempo al tempo Mesojn en Esperanto je la ĉeesto de multaj esperantistoj el la nordaj regionoj de Italio.



Diakono János KIRSCH

(Mezotúr, 12/01/1961 - Szekszárd, 22/05/2012, Hungario)

Konstanta diakono, poeto, li mortis post longa, kristane tolerata sufero. La 22an de junio 1996 li estis konsekrita diakono en Pécs fare de mons-ro Mihály Mayer. Li estis la unua konsekrita diakono en sia diocezo, kiel li rakontis en letero publikigita en ĉi tiu revuo. Li kaj lia edzino Ágota estis benataj de 5 gefiloj: Janos Mark, Katalin Zsafia, Marton Aron, Peter Kristof, Veronica Ágota. La kortuŝiĝo ĉe la IKUE-anoj, kiuj konis lin persone okaze de la IKUE-kongresoj fontis el la fakto, ke oni lernis ami lian sindonemon kaj mildecon, ekzemplodonaj por ĉiuj. Vendredon, la 25-an de majo okazis la entombigo en la tiel nomata novurba preĝejo de Szekszárd kie li servis. Ĉeestis 2 episkopoj, preskaŭ 40 pastroj kaj 10 diakonoj kaj multaj konatuloj inter ili ankaŭ esperantistoj. Flanke de la estraro de IKUE ĉeestis la unua vicprezidantino, Marija Beloŝević. Dum la meso la adiaŭan predikon diris la loka paroĥestro. Fine de la meso pastro Attila Szép havis okazon diri kelkajn vortojn en E-o post jena hungarlingva enkonduko: “Karaj gefratoj! Esperanto por Johano kaj la familio estis korafero. Al la hodiaŭa entombiga ceremonio oni alvenis ankaŭ el eksterlando, pro tio kelkajn vortojn Esperantlingve mi diras”. Post la meso perpiede oni akompanis lin al la proksima tombejo laŭ la ĉefstrato: la trafiko blokiĝis pro la nombro da ĉeestantoj. En la tombejo parolis ankaŭ la urbestro de Szekszárd. Merkrede en alia urbocentra preĝejo vespere estis sankta meso por li: la granda preĝejo estis plenplena. Dum ambaŭ mesoj la legajon legis lia edzino Ágota kaj la propetajn preĝojn lia filino Veronica. En la tombejo estis la florkrono kiun Ágota kun la infanoj pretigis por Johano. Sur la rubando staris teksto E-lingve: “Ni dankas vin al Dio. Ni renkontiĝos! Ĝis revido!” kun la nomoj de Ágota kaj la 5 infanoj. La tuta ceremonio estis kortuŝa tamen plena da dankemo kaj espero. Poste multaj diris inter si: ni devas helpi la familion. Do, ni preĝu por Johano kaj kiel eble zorgu pri la familio. Kelkaj IKUE-anoj sendis personan donacon. Por gesto de solidareco: Ágota Kirschné, Pázmány tér 6., HU-7100 Szekszárd, IBAN-numero de la banka konto: HU24 1177 3463 0024 0206 0000 0000, SWIFT-kodo: OTPV-HU-HB

*Ripozon eternan donu al ili, Sinjoro. Kaj senfina lumo brilu al ili.
Ili ripozu en la paco. Amen.*

RADIO Vatikana - Elsendoj en Esperanto

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama **horo 21.20 MET** (19.20 UTC), **DIMANĈE** kun daŭro 8-minuta kaj **MERKREDE** kaj **ĴAŬDE** kun daŭro 9-minuta.

Radio Vatikana anoncis, ke ekde la unua de julio 2012 finiĝos elsendado per mezaj ondoj kaj tiu per kurtaj ondoj al plejparto de Eŭropo kaj Amerikoj, kiuj estas la mondoregionoj en kiuj la loka reelsendado kaj la aŭskulto pere de Interreto estas jam nun la ĉefaj rimedoj por uzi la servojn de Radio Vatikana. Je la momento de la presado de ĉi tiu numero de EK oni ankoraŭ ne scias ĉu ankaŭ la E-programo estos aŭskultebla nur per Interreto, satelito kaj lokaj radiostacioj.

Por aŭskulti per la Interreto: http://www.oeumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

Arkivo: <http://www.radio-vatikana-esperanto.org>

Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon.

Skribu al: RADIO Vatikana - ESPERANTO
SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO
Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informaga gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provokzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe informante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La baza jara kotizo de membroabonanto estas 25€, sed ĝi varias laŭ la lando: petu informojn rekte de la landaj reprezentantoj.

Se Via lando ne estas listigita ĉi tie, bonvolu kontakti rekte la Centran Oficejon de IKUE.

Membroj de IKUE rajtas aboni tra IKUE la KELI-revuon "Dia Regno" kontraŭ 10,00€. Membroj de KELI rajtas aboni EK kontraŭ 12,50€, pagendaj al la KELI-kasisto.

Argentino	Daniel A. Cotarelo García, Rivera Indarte 232 P.1 A, RA-1406 Buenos Aires
Aŭstrio	Hans M. Maitzen, Endemanngasse 6-18/1/24, A-1230 Wien <i>EK-peranto:</i> Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg
Belgio	Walter van den Kieboom, Wapenplein 17 - 8 , B-8400 Oostende
Brazilo	Lejsester J. Flores Mirò, Seminário Paulino 8556, Via Raposo Tavares km 18,5, Jd Arpoador, BR-05576-200 São Paulo SP <i>EK-peranto:</i> Brazila E-Ligo, C.P. 03625, BR-70084-970 Brasília DF
Burundio	Jean Thomas Mishosi Birindwa, B.P. 781, Bujumbura
Ĉeĥa Resp.	Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice
Danlando	Eugeniusz Rybarczyk, Bispeparken 29.1th, DK-2400 Copenhagen NV
Estonio	Vjačeslav Hromov, p.k. 623, EE-12602 Tallinn
Francio	Anne-Marie Chaney, 56 rue Corvisart, F-75013 Paris
Germanio	Hans Moser, Gasteiner Str. 31, D-10717 Berlin
Hungario	P. Lajos Kóbor, H-9484 Pereszteg
Italio	Giovanni Daminelli, Via Lombardia, 37, I-20099 Sesto S.Giovanni
Japanio	Hatiroo Matubara, Namimatu-tyo 4/5, 596 Kisiwada-si, Oosaka-hu
Kongo	Jean Bosco Malanda Lutete, B.P 761, Kinshasa XI
Kroatio	Marija Belošević, Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb
Kubo	Alberto José García Fumero, Calle 26 No 3313 E/33 y 35 Playa CP-11300 Ciudad Habana
Latvio	Jazeps Šlars, Zvaigžņu 20-26, 1009 Riga
Litovio	Adomas Mečislavas Grikpedis, A. Povilaičio 12-200, LT-2050 Vilnius
Nederlando	Simon Paul Smits, Deken Tomaslaan 32, NL-4453 AL 's-Heerenhoek
Nov-Zelando	Mike Leon, 171 Oxford Terrace, Lower Hutt
Pollando	Janina Trzpił, al. Wyszyńskiego 5F m 20, PL-21-560 Miedzyrzec Podlaski
Portugaliao	Portugala E-Asocio, rua Dr J.Couto 6 r/c A, P-1500 Lisboa
Rumanio	Ioan Weiss, Str. Traian Nr. 28 Ap. 22, RO-430044 Baia Mare
Slovakio	Pavol Petřík, Na Dujave 3, SK-082 56 Pečovská Nová Ves
Tajlando	P. Marcel Perray, G.P.O. Box 1846, Bangkok 10501